LSG FORUMO n–ro 142
(1-2 / 2009)
Membrogazeto de Ligo de Samseksamaj Geesperantistoj

# LSG kunvenas en la urbo de Zamenhof



## Enhavo:

Ĝeneralkunveno de LSG dum la UK 2009 en Bialistoko 3
Pollando kaj samseksemo 4
Gejoj en Irako: La kaŝiteco por supervivi 6
Perfortita kaj murdita pro esti gejino 8
Kiuj estas la Radikalaj Feoj ? 10

L. S. G.

**Ligo de Samseksamaj Geesperantistoj**

interretejo: http://lsg-esperanto.org
adreso: la sekretario (vidu sube)
membriĝo: ĉe la sekretario
kotizoj: 10 EUR por 1 jaro
25 EUR por 3 jaroj

**Estraro**

Prezidanto

Francis [fsoghomonian at yahoo.fr]

Sekretario

Rolf [lasekretario at gmx.net]

kaj kasisto

Rolf [lakasisto at gmx.net]

Estraranoj

Arnold [arvimide at earthlink.net]

Paul Harry [phsb at orange.net]

Retprizorganto

Randy [randy.dean at pobox.com]

**FORUMO 142**

**Membrogazeto de la LSG (1/ 2009)**

adreso: la sekretario (vidu supre)
redakcio: [laredaktanto at gmx.net]

Maŭro, Italio
Juanjo, Hispanio

interreta versio: La gazeto aperas ankaŭ interrete kiel PDF-dosiero (vidu interretejo) Por via integro, ĉiuj eventualaj familiaj nomoj kaj adresoj estas forigataj en la interreta versio.

ekspedo la sekretario (vidu supre)

! *Nepre **ne** kontaktu la personon sur la etikedo de la koverto. La persono **ne** estas ligano. Nur pro la favoraj poŝt-tarifoj ni forsendas la gazeton el Ĉeĥio*

**Limdato por FORUMO 143:** 2009-08-31

## Nia saluto al la kongresontoj

Karaj legantoj,

La redakcio de la bulteno de LSG ŝatas bondeziri al la kunvenontoj ĉe la Universala Kongreso en Bialistoko gajplenan etoson dum la kongresa semajno kaj fruktodonan laboron por nia asocio.

Per tiu formala XIX-jarcenta-stila salut-formulo, ni celas ankaŭ kunĝoji kun vi ke ĉi-jare niaj membroj kunvenas en lando, en kiu la civilaj bataloj pri la samrajtigo de la samseksemuloj renkontas pli altajn barojn, kiel okazas en almenaŭ duono de la eŭropaj landoj (inter kiuj mia Italio, lasu min diri! [rim. de Maŭro]).

Ni ankaŭ esperas, ke en la ĝenerala kunveno de LSG vi sukcesos trovi plibonigajn solvojn ankaŭ por nia modesta bulteno kaj ĝia redaktado.

En ĉi tiu numero, vi trovos longajn artikolojn pri interesaj okazoj, kaj praktike neniun bildon.

Ni instigas vin plu kontribui, post la kongreso, sed ankaŭ dum la tuta jaro, per originalaj artikoloj aŭ tradukoj, pri temoj pri kiuj nur **vi** povas raporti.

*Maŭro kaj Juanjo*

**Kontribuoj por FORUMO kiel informoj, bildoj kaj artikoloj estas ĉiam bonvenaj**

*Vi bonvolu kompreni …*

*… ke nur libere uzeblaj kontribuoj povas esti akceptataj*

*… ke estas neniu garantio, ke alsenditaj kontribuoj estos publikigataj*

*… kaj ke materialo nur en esceptaj kazoj povas esti resendita al vi.*

*Ni konservas al ni la rajton redakcie ŝanĝi kontribuojn.*

*Nesubskribitaj artikoloj estas de la redakcio.*

# Ĝeneralkunveno de LSG dum la UK 2009 en Bialistoko

**Tagordo:**

1) Elekti protokoliston
2) Akcepti aŭ ŝanĝi la tagordon
3) Trovi raportistojn por:
   a) Kongresa Kuriero
   b) La Esperanta gazetaro
   c) Nacilingvaj gejaj gazetoj
4) Trakti la protokolon de la antaŭa ĝenerala kunveno
5) Trakti raporton kaj spezojn por la jaro
6) Trakti eventualajn landajn raportojn
7) Diskuti la agadojn de LSG kaj ĝian estontecon
8) Decidi la financan estontecon kaj la jarkotizon
9) Elekti prezidanton, kasiston, sekretarion, retprizorganton, estraranon por varbado kaj eventuale unu kroman estraranon
10) Diskuti la bultenon kaj ties redaktonto(j)n
11) Debati eventualajn rezoluciojn
12) Eventualaj aliaj aferoj
13) Decidi pri dato kaj loko de venonta ĝenerala kunveno
14) Omaĝo al forpasintaj LSG-anoj
15) Fermi la kunvenon.



**Protokolo de la pasintjara kunveno en Roterdamo:**

1. Randy DEAN akceptis esti protokolisto.
2. Ne estis ŝanĝoj al la tagordo.
3. Arnold VICTOR akceptis esti raportisto de la kunveno.
4. La protokolo de la antaŭa ĝenerala kunveno estis aprobita.
5. La raporto de la kasisto ne alvenis, sed la financoj estas en normala stato.
6. Estis amerika prezento pri LSG ĉe la komuna usona/kanada kongreso.
7. Maŭro komentis, ke ni devus uzi nian tempon en la kongresejo parolante al la ne-membroj pri niaj agadoj.
8. La jarkotizo restos same.
9. Francis SOGHOMONIAN estis elektita kiel prezidanto (li aldonis kondiĉon ke tio estu por unu jaro). Rolf KÖHLER estis reelektita kiel kasisto/sekretario. Randy DEAN estis reelektita kiel retprizorganto. Arnold VICTOR kaj Harry BARRON estis elektitaj kiel estraranoj.
10. Ne estis decido pri la redaktado de la bulteno.
11. Estis unuanime aprobita rezolucio sendi bondezirojn al la sekretario post operacio. Estis unuanime aprobita rezolucio sendi kondolencojn al Fritz FERDINAND pro la forpaso de lia patro.
12. Estis anoncoj: la LSG budo estos ĵaŭdo, estos vizito la COC (la landa geja/lesba organizo) lundo, kaj estos tagekskurso la Amsterdamo kaj Haarlem merkredo.
13. La venonta ĝenerala kunveno estos ĉe la 2009 UK en Białystok.
14. Starado por forpasintaj LSG-anoj.
15. La kunveno estis fermita.

# Pollando kaj samseksemo

*Ĉi-jare la Universala Kongreso okazos en la gepatra lando de Ludwik Zamenhof, Pollando, la ŝtato, kiu kuŝas en la centro de Eŭropo. Sed ĉu ĝi vere estas lando je la komplete eŭropa nivelo?*

Paweł FISCHER-KOTOWSKI[*]
retpoŝtadreso: fiskot@gmail.com

Estas tute memkomprenebla – samseksemulo ne estu instruisto – tiel opiniis Lech Kaczyński, nuna prezidento de Pollando, kiam estis ankoraŭ prezidento de Varsovio, la ĉefurbo de Pollando. Tamen ĉi-tio okazis kelkaj jaroj antaŭe, nun en Pollando situacio estas pli amika al gejoj kaj lesbaninoj. Gejfobia[1] vidpunkto, malgraŭ tuttempe ĉeestanta, pli kaj pli ofte estas motivo por honto en politikaj kaj inteligentaj socioj. Ni, kiu alvenos Pollandon julie, demandu: kiel aspektas jura kaj socia situacio de gejoj kaj lesbaninoj en Pollando?

## Juro

Interesa estas fakto, ke en Pollando samseksemo neniam estis kontraleĝa – nenia pola leĝo malpermesis seksajn kontaktojn inter personoj de sama sekso! Jura "protektilo" aperis nur en la jaro 1997, kiam en Konstitucio parlamento malpermesis diskriminacion "pro ajna kaŭzo". Konkreta leĝo, kiu malpermesas diskriminacion ĝuste pro seksa orientiĝo estas "Kodo de laboro", tamen tiu enskribo ĉeestas nur pro eŭropuniaj direktivoj. Ĉi tiu kodo estas la sola leĝo kiu realigas kontraŭ-diskriminaciajn direktivojn de EU. Aliaj tuttempe atendas agojn de polaj aŭtoritatoj.

En la jaro 2005 Lech Kaczyński, menciita supre, kiam prezidentis Varsovion, malpermesis organizi Paradon de Egaleco, la plej grandan polan GLAT-manifestacion. Parado okazis, kaj post la verdikto de Eŭropa Kortumo pri Homaj Rajtoj en Strasburgo, libereco de manifestacioj de gejoj kaj lesbaninoj estas protektita de pola juro.

En la jaroj 1985-1987 komunismaj aŭtoritatoj organizis operacion „Hiacinto", kiu temis pri arestitoj kaj registritaj informoj pri miloj gejoj. Oni taksas, ke dum PRL (Polska Rzeczpospolita Ludowa – Pola Popola Respubliko) oni fondis kartotekojn por 10 mil personoj.

En Pollando ekzistas nek samseksa edz(in)eco, nek registrita partnereco. En 2004 prof. Maria Szyszkowska, senatorino prezentis projekton en Senato. Ĝi akceptis projekton, tamen Sejmo, malpli alta ĉambro de pola parlamento, neniel reagis. Interesaĵo estas, ke varsovia ZTM (Zarząd Transportu

---

[*] Paweł Fischer-Kotowski (n. 1990) estas prezidanto de Asocio "Lambda Bydgoszcz" – loka GLAT-organizo en Pollando. Eksciu plu ĉe la retpaĝo http://www.lambda.bydgoszcz.pl (ankaŭ esperante). Oficiala esperantlingva retpaĝo de la aŭtoro: http://eo.fiskot.info

[1] Gejfobio estas en alia formo la sama vorto kiel la pli konata homodobio.

Miejskiego – Administristo de Urba Transporto) en sia regularo skribis, ke ĉiaj avantaĝoj por partneroj de laboruloj estas alireblaj sendepende de ilia sekso.

Kompreneble, samseksemuloj ne povas adopti infanojn. Ĉi-tiu regulo ne estas skribita en juro, tamen se "socia intervjuo" montros samseksemon de eventuala patr(in)o, probable, li aŭ ŝi perdas ŝancon por infanadopto.

> En Pollando gejfobia vidpunkto komenciĝas esti motivo por honti, do homoj, kiuj malakceptas ge-samseksemulojn ne tro ŝatas laŭte paroli pri tio. Temo iomete tabuiĝas. Gejoj kaj lesbaninoj devas laŭte paroli pri ĉi-tiu temo, pri sia seksemeco, por plibonigi sian situacion.

### Socio

Laŭ enketoj, nur 15% poloj konas ian gejon aŭ lesbaninon. 66% opinias, ke socio malamike traktas gesamseks-emulojn, 20% asertas, ke juro kontraŭbatalu samseksemajn personojn. Nur 27% poloj aprobas demonstradoj de GLAT-movado.

En Pollando, la plej katolika – krom Vatikano – ŝtato en Eŭropo, Eklezio estas forta kaj laŭte kontraŭas gesamseksemulojn. Ĝia voĉo estas traktata ege serioze kaj plimulto da homoj – politikistoj, instruistoj, oficistoj, entreprenistoj ktp. – estas preta ŝanĝi siajn decidojn pro instruoj de pastro aŭ episkopo.

En laboro seksan orientiĝon kaŝas 34% samseksemuloj, 51% ne diras al parto de kunlaborantoj. 27% gejoj kaj lesbaninoj kaŝas seksan orientiĝon en lernejo aŭ universitato, 52% ne diras pri ĝi al parto de gekolegoj. 62% kaŝas antaŭ najbaroj.

### GLAT-movado

En Pollando funkcias ĉirkaŭ 100 kluboj por gejoj, lesbaninoj, ambaŭseksemuloj kaj transgenruloj. Plej multe da ili estas en Varsovio kaj Krakovo. Unua (preskaŭ-)geja klubo estis fondita en 1990 jaro - "Café Fiolka" en Varsovio invitis gejojn kaj lesbaninojn en difinaj tagoj de semajno.

En Pollando funkcias kelkaj GLAT-organizoj, ĉefe en ĉefurbo. Unua organizo – Varsovia Samseksema Mov-ado (Warszawski Ruch Homoseksualny) – estis fondita en la jaro 1987, tamen aŭtoritatoj rifuzis registri ĝin, do unua vera, registrita organizo fondiĝis en en la jaro 1990 – Asocio de Grupoj Lambdo (Stowarzyszenie Grup Lambda). En plej bona momento ĝi havis grupojn en 13 polaj urboj! Tamen finis agadon en mezo de 90-aj jaroj. En 1997 jaro naskiĝis Asocio Lambdo Varsovio (Stowarzyszenie Lambda Warszawa), kiu daŭrigas agadon de varsovia grupo de antaŭa asocio. Lambdo Varsovio estas nun la plej malnova pola GLAT-organizo, kiu tuttempe funkcias. Amuza informo estas, ke unu el la fondintoj kaj nuna prezidanto estas... Esperanto-parolanto! Iam pli aktiva, nun pro multo de laboro kun organizo (la plej aktiva kaj plej

profesieca pola GLAT-organizo!) ne plu aktive agadas en Esperantujo.

Ekzistas ankoraŭ Kampanjo Kontraŭ Gejfobio (Kampania Przeciw Homofobii) – tutlanda GLAT-organizo kun filioj, Trans-fuzja – fondaĵo, kiu temas pri transgenruloj. Komenciĝas fondiĝado de lokaj GLAT-organizoj – Lambdoj en Bydgoszcz, Krakovo, Szczecin, Asocio "Diverseca Laborejo" en Toruno.

Plej grandaj, plej popularaj GLAT-manifestacioj okazas en Varsovio – Parado de Egaleco (ekde 2001 jaro, en 2004 kaj 2005 malpermesita, en 2009 ĝi okazis la 13-an de junio), Krakovo – Marŝo de Toleremo (ekde 2004 jaro, en 2005 malaranĝita per organizantoj) kaj Poznano – Marŝo de Egaleco (ekde 2004 jaro, en 2005 brutale dispelita de polico).

Pollando estas opinie dividita – oni parolas pri Pollando A kaj B. Pollando A situas en maldekstra flanko de Vistulo kaj estas pli riĉa, pli tolerema kaj Pollando B situas en dekstra flanko de Pollando – tie estas malpli riĉe, malpli tolereme. En dekstra flanko de Vistulo nur en 2009 komenciĝas ia agado, kiu temas pri GLAT. En Rzeszów oni organizis kelkajn GLAT-aranĝojn (klubajn), en Lublino probable fondiĝos filio de GLAT. Bjalistoko, kvankam ĝi estas ĉefurbo de regiono, ĉefurbo de provinco, havas neniajn klubojn kaj organizojn.

En la interreto mi trovis informon, ke gejamika estas Muzika Klubo METRO (Klub Muzyczny METRO), ĉe la strato Białówny 9A en Bjalistoko. Tamen ĉi-tiu tezo estas diskutata kaj en la reto ekzistas ankaŭ opinioj, ke ĝi tute ne estas gejamika kaj oni atentu. Pri aliaj lokoj en tuta Podlaĥia Provinco mi trovis neniajn informojn en la reto. Do plej proksimaj kluboj kaj organizoj estas en Varsovio.

Se vi ŝatus scii ion pli, demandu min retpoŝte aŭ per dissendolisto de LSG.

# Gejoj en Irako: La kaŝiteco por supervivi

Rakontas Peter Tatchell [2] en lia kroniko en "The Guardian" ke dum la iamaj lastaj tagoj de sklaveco en Usono estis sekretaj retoj kaj akceptaj domoj, kiuj nomiĝis "the Underground Railroad" (la subtera vojo), kiuj helpis malaperigi milojn da sudaj sklavoj en ilia vojo ĝis libereco en la Nordo de la lando.

Hodiaŭ, 200 jarojn poste, moderna versio de ĉi tiu "subtera vojo" estas kunordigata kaj funkciigata de kolektivo, Irako LGTB Exile (Irakaj GLAT-ekzilitoj) kiu estas savanta dekojn da samseksemaj homoj, ebligante fuĝi de la islamaj patroloj de la morto, disponigante akceptajn domojn en Bagdad kaj aliaj irakaj urboj kaj sekrete pasigante gejojn, lesbaninojn, ambaŭseksemulojn kaj transseksulojn al najbaraj landoj, kie la

[2] Artikolo bazita sur la kroniko de la eldonisto Peter Tatchell en reta versio de The Guardian., laŭ hispanlingva traduko farita por la Madrida GLAT-asocio COGAM de F.A. (helpanto de COGAM).

homhelpaj rimedoj de Unuiĝintaj Nacioj povas pli facile atingi ilin.

Depost la falo de Saddam Hussein, homofobio kaj timigo al la GLAT-kolektivo multe malboniĝis jam ekde la malaperigo de la tirana diktatoreco "baathista"[3] kio kaŭzis la malaperon de centjara ŝtato, kreis ĥaoson, senleĝecon kaj lasis flori religian fundamentismon, unu el kies rezultoj estas kontraŭgeja teror-kampanjo de islama inspiro kontraŭ tiu iraka kolektivo. Ekzemplo estis la fatvo[4] lanĉita en 2005 de la ĉefa ŝijaista kleriko en la lando, ajatolo Ali al-Sistani (tiun saman George W. Bush taksis kiel moderan kaj kun helpo de la brita registaro donis kurac-helpon). La integrisma gvidanto, en sia edikto, instigis la fidelulojn mortigi per la plej malbonaj formoj kaj plej severaj manieroj plej multajn GLAT-membrojn... Li estis kontraŭ Saddam, do, la "Okcidento" subtenis lin spite de liaj sang-avidaj religiaj mandatoj.

Kvankam la ĝenerala situacio de sekureco en Irako pliboniĝis dum la lastaj du jaroj, por la homoj de la GLAT-kolektivo ĝi severe ruiniĝadis ĝis la punkto ke la sistemaj murdoj efektiviĝas ankaŭ per la manoj de policistoj kaj agentoj de la Interna Ministerio (iuj el ili partoprenis en por-iranaj milicioj kiel la korpoj "Badr").

Tiel, oni mortpafas la gejojn en iliaj domoj, laborejoj, aŭ surstrate. Inkluzive la infanojn suspektitajn esti gejaj. Kaj tio okazas fare de tiuj, kiuj pretendas fari tion laŭ mandato de la "demokratia" iraka registaro, kies celo estas elradikigi la "malmoralecon" kaj la "kontraŭ-islamajn" kondutojn, laŭ plano de murdoj celantaj "purigon", en kio montriĝas ankaŭ la forigo de samseksemo de la lando, pri kiu atingo la murdantoj fanfaronas en granda nombro.

Teroro al kiu partoprenas per sia neglekto kaj emo deturni la rigardon la menciita interna ministerio, ŝirmante la malhonestan policon kaj la fundament-isman islamismon ekstermantan la samseksemulojn. Kontraŭ tiu teroro kaj por savi vivojn la iraka GLAT-kolektivo kreis tiun "subteran kviran vojon".

Komentas Ali Hili, kunordiganto de la iraka grupo: "Ni ankaŭ helpis homojn fuĝi de Irako al najbaraj landoj, kie ni starigis projektojn, por restariĝi kaj komenci de nove. Niaj klopodoj celas registrigi gejajn rifuĝintojn en la Alta Komisiono de UN pri Rifuĝantoj (AKNUR) kaj ni movigis iujn el ili al aliaj pli sekuraj landoj en Eŭropo kaj Nord-Ameriko, kaj tiuj bonŝanculoj komencas rekonstrui siajn vivojn".

"K" estas 33-jara arkitekto, kiu rifuĝis al Aman (Jordanio). Nun li kunlaboras por funkciigi GLAT-Irakon en tiu urbo, helpante al aliaj rifuĝintoj el Irako kaj ĝis la nuna momento sep el dudek-tri GLAT-rifuĝintoj, sekrete elirintaj de la lando al Jordanio, atingis validigi sian azilan peton ĉe AKNUR kaj ankaŭ loĝ-permesojn en landoj kiel Svedio, Usono, Nederlando aŭ Germanio..., sed ĝi en estas laboro sen

---

[3] De Baath, la partio kies gvidanto Saddam Hussein starigis en la iraka reĝimo.

[4] "Fatwa" estas ekspertizo de islama muftio pri certa temo, surbaze de la islama leĝaro (Korano kaj Sunao).

danĝero, ĉar ili estas tamen persekutataj dum sia heroa laboro kaj multaj el ili estas mortigitaj. Du lesbaninoj, kiuj aktivis en la akcepta domo en la urbo Najaf, pereis – kvazaŭ oni portus ilin al la buĉejo de viando-vendejo – pro tio ke ili provis rekapti junan viron de la seksa industrio; tio ankaŭ okazis al la kunordiganto de unu el la akceptaj domoj de Bagdad mortpafita en la frizejo kiun li administris; kaj okazis al aliaj kvin gejaj aktivuloj kiam ili intencis komenci kun alia centro en la sama urbo...

La manko de kapitalo por helpi al tiuj herooj kaj luktantoj por la reala egaleco daŭre estas problemo", konkludas Peter Tatchell. Pro tiu manko, tri el la kvin akceptaj domoj en Bagdad devis fermi, sed du estas de nove malfermitaj en senĉesa lukto por trovi kapitalojn, kiu permesas ilian ekzistadon. La mono necesas por pagi la fakturojn de bazaj bezonoj kiel elektro kaj manĝaĵo. Ĉirkaŭ dudek homoj amasiĝas en ĉiuj tiuj domoj. Kaj multe pli da irakanoj de la kolektivo bezonas novajn lokojn, kie ili povas kaŝi sin.

La ret-paĝo por kontakti kun la LGTB iraka estas: http://iraqilgbtuk.blogspot.com

# Perfortita kaj murdita, ĉar ŝi estis gejino

*Sudafriko ignoras 'korektantajn' atakojn*

La korpon parte vestitan de Eudy Simelane, stelo de la nacia virina futbala teamo de Sudafriko, oni trovis en parko en KwaThema, Johanesburgo. Simelane estis perfortita kaj batita de bando antaŭ ol ŝi estas ponardita dekkvinfoje en siajn vizaĝon, bruston kaj gambojn. Estante unu el la plej konataj futbalistinoj de Sudafriko, Simelane ankaŭ batalis por egalaj rajtoj kaj estis unu el la unuaj virinoj, kiuj malferme vivis gejine en KwaThema.

Ŝia murdo okazis la pasintan aprilon kaj, de tiam, ondo de perforto kontraŭ gejinoj daŭre kreskadis en Sudafriko. Kampanjantoj por homaj rajtoj diras, ke ĝi karakteriziĝas per 'korektanta perforto' fare de viroj, sub masko de klopodo por 'kuraci' gejinojn de ilia seksa orientiĝo.

Raporto de internacia neregistara organizo ActionAid, subtenita de la Sudafrika Komisiono por Homaj Rajtoj, kondamnas la kulturon de nepunindeco ĉirkaŭ tiuj ĉi krimoj, kiuj restas nerekonataj de la ŝtato kaj nepunataj de la juĝa sistemo.

La raporto petas de la Sudafrika kriminala jursistemo rekoni malamajn krimojn, inkluzive de 'korektanta' perforto, kiel memstara krimkategorio. Tiu ĉi devigos la policon agi pro la kreskanta perforto kaj certigos, ke rimedoj kaj subteno disponeblos al tiuj, kiuj klopodas por porti la farantojn al justico.

La krueleco de la murdo de Simelane sendis ŝok-ondojn tra

KwaThema, kie ŝi estis konata kaj amata pro porti sportan famon al la kvartalego.

Ŝia patrino, Mally Simelane, diris, ke ŝi timis pri la sekureco de sia filino, sed ke ŝi neniam imagis, ke ŝia vivo estus forprenita tiamaniere.

"Mi timas, ke tiuj homoj eble murdos ankaŭ min. Mi ne scias tion, kio okazis" ŝi diris. "Pro kio ili faris tiun teruran agon? Pro tio, kiu ŝi estis? Ŝi estis dolĉa virino, ŝi neniam atakis neniun ajn. Pro kio oni murdus ŝin tiel? Ŝi estis ponardita, dudek kvin truoj en ŝi. La tuta korpo, eĉ sub la piedoj."

THE GUARDIAN parolis al gejinoj en kvartaloj de Johanesburgo kaj Kaburbo kiuj diris, ke ili estas celataj por perforto kaj ke la minaco de perforto iĝas ĉiutaga sufero.

"Ĉiun tagon oni diras al mi, ke oni murdos min, ke oni perfortos min, kaj ke poste mi iĝos vera knabino," diris Zakhe Sowello de Soweto, Johanesburgo. "Kiam oni estas perfortita, oni havas multajn pruvojn sur sia korpo. Sed kiam ni raportas tiujn krimojn, nenio okazas, kaj poste oni vidas tiujn knabojn libere promenantajn en la stratoj."

Esplorado fare de Triangle, sudafrika organizo por gejaj rajtoj, malkaŝis, ke 86% de nigrulaj gejinoj en la Okcidenta Kabo vivis timante seksan perforton. La grupo diras, ke ĝi traktas ĝis dek novajn kazojn de 'korektanta perforto' ĉiusemajne.

"Ni vidas pinton de la nombroj de perfortitoj, al kiuj oni diris dum la atako, ke ilia gejeco estis la kaŭzo de tio, kio okazis al ili" diris la direktoro de Triangle.

Agresema kaj virisma politika medio kontribuas al la malagemo de la polico rilate al atakoj kontraŭ gejinoj kaj estas parto de kreskanta kultura letargio rilate al la altaj niveloj de pro-seksa perforto en Sudafriko.

"Pridemandante la kialon de la celigitado de gejinoj, oni konsideru la kialon de perforto kaj murdo de ĉiaj virinoj en Sudafriko," diris Carrie Shelver, de la grupo por virinaj rajtoj Powa ('Forteco'). Do, oni konsideru la virisman kulturon, kiu subpremas virinojn kaj kiu vidis ilin kiel nurajn seksaĵojn. Do, kiam oni trovas gejinon, ŝi estas ofendo al tiuspeca vireco.

La sudafrika nacia persekutista aŭtoritato diris: "Kvankam malamaj krimoj – speciale de seksa speco – abundas, ili ne estas afero prioritatita de la Sudafrika registaro kiel specifa projekto."

La polico preterlasis postsekvadon de ĉeestintulajn atestojn, kaj daŭrigadon de ilia esplorado pri alia duopa perforto kaj murdo de gejina paro Sizakele Sigasa kaj Salome Massooa en julio 2007. Tiu fakto kaŭzis formadon de la kampanjo '07-07-07', koalicio de grupoj por homaj rajtoj kaj egaleco, postulante justecon por virinoj celigitaj per tiuj atakoj.

Sigasa kaj Massooa estis torturitaj, bande perfortitaj kaj mortpafitaj proksime de iliaj domoj en Meadowland, Soweto, en julio 2007, post kiam ili estis parole mistraktitaj.

Kampanjantoj de homaj rajtoj kaj egaleco esperas, ke publika indigno kaj

naŭzo je la morto de Simelane kaj la julia proceso de la tri viroj akuzataj de ŝia perforto kaj murdo helpos al finigo de la perforto kontraŭ gejinoj tra la tuta Sudafriko.

Malgraŭ pli ol tridek raportitaj murdoj de gejinoj dum la lasta jardeko, la proceso de Simelane efektivigis la unuan kondamniton, kiam la viro, kiu kulpopledis je ŝia perforto kaj murdo estis enprizonigita lastmonate. *[Laŭ la dato de la artikolo, ĉi tie oni parolas pri la komencaj monatoj de 2009, n.d.l.r.]*

Kondamnante, la juĝisto diris ke la seksa orientiĝo de Simelane havis 'neniun signifon' en ŝia murdo. La proceso de pliaj tri viroj pledantaj nekulpaj je perforto, enrompo kaj murdo komenciĝos en julio.

En Soweto kaj Kwa Thema, virinoj ŝajnas esti nekonvinkitaj, ke la kazo de Simelane ŝanĝos aferojn al pliboniĝo.

Phumla parolas pri sia sperto, ke ŝi lernis 'klasikan lecionon' fare de grupo de viroj kiuj homrabis kaj perfortis ŝin dum ŝi revenis de futbala trejnado en 2003. Ŝi diras, ke fakte ĉiu gejino en ŝia komunumo suferis ian perforton dum la lasta jaro kaj bezonos pli da unu proceso por haltigi tiujn okazojn.

"Ĉiun tagon oni sentas, ke estas kiel tempobombo atendanta eksplodon," ŝi diris. "Oni ne havas la liberecon moviĝi, oni ne havas la spacon por agi laŭplaĉe. Oni ĉiam timas kaj sentas sian vivon limigitan. Kiel virinoj kaj kiel gejinoj ni bezonas esti tre konsciaj, ke estas fakto de la vivo, ke ni ĉiam estas en danĝero."

# Kiuj estas la Radikalaj Feoj?

*Ĉi-jare almenaŭ 3 LSG-anoj partoprenas en la granda Feo-kunveno okazanta de la 17-a ĝis la 27-a de julio en Folleterre (apud la vilaĝo Ternuay, proksimume 20 km nord-oriente de la franca urbeto Lure).*

La komunumo de Radikalaj Feoj estas bunta kaj loza grupo de spirite interesataj gejoj. Ĉar neniu partikulara doktrino dominas, la movado de Radikalaj Feoj estas aperta por ĉiuj specoj de spiritaj orientiĝoj. Oni povus diri ke Feoj centras sian spiritan vivadon sur diversaj vojoj de religiaj esprimoj. Aliĝas druidoj, vika-anoj (« wicca »-anoj), ŝamanoj, hinduoj, budhanoj, taoistoj kaj tre malmultaj judoj, kristanoj kaj islamanoj. Ankaŭ kelkaj gejoj de aliaj agnoskitaj aŭ neagnoskitaj kredoj troviĝas inter Radikalaj Feoj. Feoj estas « spirita tribo », kiu praktikas ideojn de geja spiritiĝo sur libera kaj sendependa vojo. Du kernaj konceptoj estas esencaj por kompreni la alproksimiĝon de Radikala Feo al spiriteco: la principo de androgineco kaj la ideo pri subjekto, subjekta konscio. Ambaŭ valoroj povas esti rigardataj kiel radikantaj en la fundamenta koncepto de alieco. Feoj estas tre malnova, "kuspa" popolo. Rememorante pri io kio estis forgesita aŭ subpremita, Feoj plenumas sian aliecon

sur sia unika vojo!

*Ĉu la Feoj havas religian sistemon?*

La komunumo de Feoj estas libera, spirita vojo, kiu ne devas sekvi doktrinan sistemon. Religioj estas organizitaj, havas hierarkiojn kaj estrarojn, doktrinojn kaj dogmojn. Tiaj organizaĵoj estas kvazaŭ antipodaj por la komunumo de Feoj. Eblas aliĝi al diversaj kredoj kaj tamen rigardi sin Feo! Ne sekvante specifan kredkonfeson, vi povas trovi paletron kaj da ekzistantaj tradicioj kaj da meminventitaj kredopraktikoj. Iuj partoprenas en adorado al la kuspa diino, antaŭ ĉio al la Kornita Dio ofte konsiderata kiel komplemento al inaj orientiĝoj, dum aliaj adoras specojn de diaĵoj el diversaj paganaj kulturoj. Feoj ofte emas celebri la sanktecon de la Tero kiel estaĵon kaj inan kaj masklan, patrinon kaj patron. Sur tiu vojo ili integras androginecon kaj kontribuas al solvo de dualismo en la homa kaj dia kosmo. Multaj feoj kredas je konekso inter magia energio, adorado al pagana diaĵo kaj celebrado de ekstazaj gejaj ritoj.

*Ĉu estas en la komunumo de Feoj politikaj aŭ religiaj rilatoj al aliaj grupoj?*

La komunumo de Feoj ne havas rilatojn al alia grupo ol al si mem. La Feoj ne havas partikularan politikan filozofion. Kiel antaŭe menciite, ili ankaŭ ne havas tre specifan religian filozofion. Sed sekvante profunde ekologian orientiĝon la plej multaj Feoj ensorbas ekologiajn ideojn por sia vivo. Tio signifas, ke multaj Feoj klopodas koncepti orgasman mondvizion en kiu la universo estas rigardata kiel organa, viva kaj spirita. La plej multaj Feoj provas kultivi delikatsentan kaj mildan kontakton kun la homa kaj nehoma mondo. Ĝenerale ili havas konscion pri la limoj kaj la delikata ekvilibro inter la homa sfero kaj la biosfero. Tial la plej multaj Feoj provas integri konservadon de la naturo per ekzemple antikonsumisma kaj anti-materialisma etiko. La proponata celo de spirita memrealiĝo atingiĝas tra spirita aŭ transpersona ekologio, kiu emfazas la bezonon al transformaj ŝanĝoj en la homa konscio. Laŭ multaj Feoj, la alieneco kaŭzata de la mekanika kaj dualisma mondkoncepto de industriigita socio povus esti kuracata nur per repreno de la sankta rilato de la homaro al ĉiuj aspektoj de la kreitaĵo.

*Kiel la Feoj estas “organizitaj”?*

Ĝenerale per pli-malpli anarkia metodo: Ĉiuj decidoj estas alprenataj sur interkonsenta bazo fare de la grupa konscienco en apertaj “rondaj” kunvenoj. Kiel por multaj aliaj nov-paganoj, la “rondo” estas formo de “rita” esprimo ĉe kunvenoj de Feoj. La “rondo” estas signifa simbolo por la Feoj kaŭze de sia ne-hierarkia kaj egaliga naturo. Neniu partoprenanto estas pli grava ol alia en rondo, kaj ĉiu havas egalajn ŝancojn partopreni aŭ esprimi siajn sentojn aŭ vidpunktojn. Ne estas “estroj”, nur “servantoj” al la grupo. Ĉiu kondutas laŭ siaj propraj konvinkoj kaj kredsistemoj.

Feo-kunveno estas malstrikte organizita renkontiĝo de Feoj por festi iliajn individuajn stilojn de enspiritiĝo en kolektiva, fidema etoso kun nur minimumo da strukturoj kaj maksimumo da fido je la potenco de mem-organizado.

*Kion Feoj efektive faras dum kunvenoj kaj rito?*

Feoj ĉirkaŭpremas vivon en ĝia "holisma" tuteco. Ĉi tio esprimeblas diversmaniere. Dum kunveno, Feoj festas la ĉiutagan vivon kaj la naturon en splendaj, multaspektaj manieroj. Vi povas ekkoni la ĉirkaŭan naturon, arbarojn, dunojn, plaĝojn aŭ maron. Sola aŭ kun aliaj, vi povas fari multon, aŭ simple malstreĉiĝi kaj fari laŭplaĉe. Feoj plenumas aŭ kreas ritojn signifoplenajn por si en siaj vivoj, inkluzivante ĉiajn specojn de paganaj ritoj, kiuj konfirmas kaj celebras iliajn vivojn kiel gejoj. La Feo-kunvenoj estas sankta spaco kaj tempo al kiuj Feoj venas por partopreni, ami kaj subteni ĉiun alian. Ĉiu Feo-kunveno evoluigas sian propran ritan praktikadon adekvatan al la vivoj de siaj membroj kaj al ĉiu specifa aŭ spontanea situacio. Okazas ege granda interfekundiĝo de paganaj kaj aliaj tradicioj. Kaj estas alta grado de kreemo, ĝojo kaj petolemo en rilato al la ritoj de la Radikalaj Feoj. Per unu vorto: Feoj celebras la vivoĝojon en sia propra geja vojo.

*Kiam kaj kiel okazas Feo-ritoj?*

Okazas Feo-kunvenoj ĉiun plenlunon. Sed ĝenerale Feoj celebras la 8 paganajn festotagojn de la jaro (ekvinoksoj, halovino, solsticoj kaj kvaronjaraj tagoj) laŭ diversaj manieroj. Kaj evidente plej intensive ili festas la Feo-kunvenojn! Per rita muzikado, tamburado, ĉantado, dancado, preĝado... aŭ ŝlimbanoj, ŝvitbanoj, ĝojfajro, trafajraj dancoj, kandeloj, spiralkreado aŭ spirala kundancado, kirldancado laŭ Sufi-maniero aŭ polkeska dancado, maskovestiĝo kaj ineskiĝo ("drag"), perukumado kaj ŝminkiĝo ktp. Iuj Feoj ŝatas kuri nudaj tra dunoj, erikejoj aŭ arbaroj. Kiel en multaj paganaj ritoj, nudeco dumrite aŭ ajnatempe estas ordinara kutimo por tiuj, kiuj ŝatas tion. La solena etoso dum la ritoj ne ekskluzivas sanktan humuron kaj "seriozan leĝerecon"...

*Kiuj partoprenas en Feo-kunvenoj?*

Ĝenerale ĉiaj specoj de spirite interesataj gejoj el ĉiaj sociaj tavoloj. La plej multaj Radikalaj Feoj apartenas al la plej amemaj, talentaj, kreemaj, trankvilanimaj, amindaj , memkonsciaj, grandanimaj, sensamaj, karesemaj kaj gajaj homoj. Ĉiuj kiuj kunvenas, estas spirite akceptemaj kaj pretaj dividi kun la aliaj fratoj kreplenan, senstreĉan kaj reciproke riĉigan tempon.

Huberto kaj Benito (200 kaj 201)